



# Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 33<sup>a</sup> jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k120/k120.html>

Plej bona registaro estas tiu, kiu ne regas (H. D. Thoreau)



Vi nur bezonas amon!

Henry David Thoreau, aŭtoro de *Civila malobeo*

N<sup>o</sup> 120<sup>a</sup>

Julio 2021

**Kajeroj****el la Sudo**

Bulteno de la Hispana Asocio de  
Laboristoj Esperantistaj (HALE).

**Enhavo**

<b>Redaktore:</b> Pri la kosto elstari.....	3
<b>Politiko:</b>	
Ĉu registaro rajtas esti stulta?.....	4
Pri Reĝa pardono.....	7
<b>Kulturo:</b>	
All you need is love!.....	10
Du gravaj centjariĝoj.....	11
<b>Literaturo:</b>	
<b>Sanigaj murdoj:</b> ĉ 6 <sup>a</sup> .....	13
<b>Pri civila malobeo</b> .....	14

Calle Jabonerías, 6.3° D  
30010 Murcia  
Hispanio  
ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**  
Redaktas: **Jesuo de las Heras.**  
Korektas: **Jozefo Pina.**  
Retskribu al: [kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)

**Pri la enhavo de la  
artikoloj respondecas ties  
aŭtoroj, ne la redakcio.**

**Ni ne korespondos pri nepetitaj  
artikoloj, kvankam ni klopodos  
publikigi ĉiun artikolon, kiun ni  
trovos interesa kaj kies enhavo  
mistraktas nenium personon.**

**Kovrilo:** Henry David Thoreau estas monda referenco por homoj, kiuj kontraŭstaras registaron pro manko da justeco kaj humanismo. Emilja Pardo Bazan' kaj Fernando de Magalĵano ankaŭ kontraŭstaris la statokuon de siaj tempoj.

**Pagmaniero:** aliĝu al HALE kontraŭ €10  
jare por ricevi la surpaperan version de nia  
magazino.

Notu, ke malfrua kotizo povas signifi perdi numeron.

**Konto** **ES98 1465 0320 08 1715077142**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Poste, sendu noton al [kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de donaco al la  
menciita konto, se oni deziras helpi kaj tamen ne ricevi la  
surpaperan version.

**Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe,  
ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:  
Scribus, Bluefish, BlueGriffon, Gimp, gFtp kaj yafc.



Nesubskribitajn  
artikolojn verkis  
la redaktoro.

Redaktore

## Pri la kosto elstari

Iri kun la amaso estas facile: sufiĉas obei tion, kion on diras. Sed Iekstari kaj diri, ke *La reĝo estas nuda*, postulas esti brava, aŭ naiva, kiel la infano de la fama rakonto. En ĉi tiu numero de **Kajeroj el la Sudo** ni legos pri tri homoj, kiuj estis sufiĉe bravaj kaj naivaj defii la statukuon, la amason, la onidiron, kaj faris ĉion, kion ili devis fari. Hispanino, hispano kaj tiu usonano, kiu protestis ĝiskarcere pri la milito kontraŭ iama Novhispanio —kripligita en nunan Meksikon—, ĉar li estimis, ke tiu milito estis maljusta.

Se estus multe da homoj tiaj en la nuna Hispanio, ni ne suferus tiun ĉi registaron, kiu emas montri sian povon per faro da absurdaj leĝoj kaj decidoj, sengravante al ili ĉu ili estas kontraŭkonstituciaj, ĉu ne. Sed nun neniuj movoj, por *esti bone vidita en la foto*, kiel vicprezidinto Alfonso Guerra diris iam. Sed kio gravas la foto? Al kiu? Ni estas je la rando de puĉo de la Registaro, kaj ne estas multe da homoj, kiuj kontraŭstaras tion. Se neniuj malebligas tion, baldaŭ estos leĝo, kiu kontraŭkonstitucie permesos al Registaro senhavigi al ni pri niaj posedaĵoj kaj eĉ nia agado, se tio konvenas al ŝtato. Tio signifas, ke homoj tiaj, kia Thoreau estis, baldaŭ loĝos en karcero, ĉar se leĝo estas, ke oni devos fari kontraŭdemokratiajn aŭ maljustajn aferojn, devo de honestaj homoj estos rifuzi plenumi tian bastardan leĝon. La Registaro de Hispanio al kutimiĝis ne esti kontrolata, kaj tio estos grava puno por la popolo. Popolo, kiu ne kontrolas la registaron, estas popolo nedemokratia.

Kiam mi verkis la artikolon *Pri reĝa pardono*, mi kredis, ke pro la kialoj, kiujn mi klarigas per ĝi, la Reĝo de Hispanio devis rifuzi subskribi tiun sensencan dokumenton, sed eĉ se mi eraris, kaj li tion faris, la kialoj ankoraŭ estas validaj, kaj montras, ke la Reĝo ne bone agis. Espereble tio estos limo, kaj li ĉesos subskribi leĝojn kontraŭ la popolo de Hispanio. Tiu pardono, aliflanke, estas tute senutila, ĉar sendependentistoj postulas pli kaj pli, kaj cedas malpli kaj malpli. Ili celas sendependiĝi, kaj poste daŭre minaci la ceteran Hispanion por akiri pli da teritorio, kiun laŭ ili apartenas al ili, eĉ se ilia rajtoj al ili estas nula.

Sed *All you need is love!*, kiel ni legos en pago 7<sup>a</sup>. Mi esperas, ke malgraŭ ĉio, vi fartos bone kaj pace legos kaj reagos al la artikoloj de ĉi tiu numero. Ĝis oktobro.

*Jesuo, redaktoro.*

## Ĉu registaro rajtas esti stulta?

**P**lej eble leganto surpriziĝas legi tiun titolon. Sed oni povas miri pri la stultaĵoj, kiujn diversaj registaroj de Hispanio jam faris laŭ nia historio.

Mi memoras, ankoraŭ studante mi ĉe universitato, ke profesorino pri Historio de Usono rakontis al ni, ke laŭ la historio de tiu lando, *ĉiam venis providenca politikisto, kiu bone faris por la bonfarto de ties civitanoj*. Senjuĝe al tiu usonemo de mia profesorino, mi rigardas la historion de Hispanio, kaj konkludas, ke tiu ne estis la kazo de nia lando de post Isabel' la Katolikistino. Nun malsanuloj de **estantismo** eble konsideras ŝin rasisma kaj kulpa pri multe da pekoj kontraŭ tiu verŝajna religio nova, **Politika Korekteco**, sed precize ĉar ŝi uzis religion katolikan por unuecigi la tutan landon, **ŝi faris bonan politikon por la bonfarto de siaj subuloj**. Ŝi diktis leĝojn por ke oni respektu indianojn, ke oni ne perforte konvertu ilin en katolikojn, male al tio, kion ignorantoj hodiaŭaj asertas sen scii pri tio, kion ili diras, nur pro tio, ke ili estas mezvaloraj kaj deziras, ke elstaruloj de istempo estu rigardataj desupre por senti sin gravaj. Tamen rigardi desupre postula esti grandaj, kio ili ne estas.

Mi parolos poste pri la nuna registaro de Hispanio, sed ni vidos, ke la afero venas el isforaj tempoj. Kiam nia lando havis imperion laŭ la tuta mondo, Napoleon' invadis ĝin, kaj dum tiu ĉi katastrofo la supozata alianculo de hispanoj, Britio, organizis la ribelon de la supozataj kolonioj —fakte ili estis provincoj de Hispanio, organizitaj kiel vicregnoj— kontraŭ la *patrina patrio*, kiu finis kun enpoŝigo de multe da oro amerika al Britio, kaj ankaŭ ŝuldoj, kiuj en la kazo de Peruo finis pagiĝi en la 20<sup>a</sup> jarcento. Usono profitis la ŝancon je 1898 por militi kontraŭ la potenco, kiu helpis ilin sendependiĝi de Britio unu jarcenton antaŭe, konkludante per la forrabo de Kubo, Porto-Riko kaj Filipinoj, en kiuj ili propagandis daŭre kontraŭ la lando, kiu donis al ties popoloj siajn kulturon, lingvon kaj religion, provizinte tricentjaran pacon, kiu finis tuj post la *sendependiĝo*. Simon' Bolivar mem konfesis, kelkajn jarojn poste, ke ili *atingis sendependiĝon koste al ĉio alia*. Tio ne ŝajnas tre inteligenta. En Kolombio li ordonis mortigi tribojn de indianoj pastunaj, kiuj dum tri jarcentoj pace vivis sub la regado de

Hispanio, pro tio, ke ili deziris daŭre esti hispanaj. Estas maldece, ke nun civitanoj de tiuj landoj, Kolombio kaj Venezuelo, akuzu Hispanion pri genocido, kiu ne okazis ĝis kiam liberiguloj Bolivar kaj San' Martín' aperis.

Sed ne sole en Ameriko estis stultaj registoj. Je la 19<sup>a</sup> jarcento estis ŝoka invento de hispano Izaak' Peral': submarŝipo. Ĉu la registaro tiutempa profitis la ŝancon gajni la plej grandan povon en la mondo kaj reakiri la respekton kaj influon en la tutan mondon, kiun ĝi iam havis? La **registaro prezidata de Práxedes Sagasta** malapogis la projekton, kaj nur la interveno de la reĝino regenta **María Cristina ebligis produkti prototipon**, tiel ĉesante esti teoria afero, kaj je 1888 la unua submarŝipo navigis sukcese unuafoje en Kartageno. Sed postaj ministroj Jozefo María **Beranger** kaj Rafael' **Rodríguez Arias** ne nur ne apogis la fabrikadon kaj disvolvon de la invento, sed **apogis kampanjon fifamigan** pri la inventinto, kiu devis forlasi la mararmeon por libere klarigi antaŭ publika opinio la veron pri sia invento. Germanoj akiris egan potencon dum la Dua Mondmilito danke al submarŝipoj, sed hispanoj jarcentduonon antaŭe pro stulteco da nia tiama registaro oponis ĝin, neante tiel la landon unuan gravecon en la mondo, kiel ĝi ne havis de la 16<sup>a</sup> jarcento. Germanoj provis konstrui imperion en sia tempo, hispanoj jam havis imperion siatempe, kiun ili ne sukcesis defendi. Admiralo Dewey konfesis, ke nur unu submarŝipo povintus malebligi la venkon de la usona mararmeo en Filipinoj —Cavite—, sed bedaŭrinde por Hispanio, tiu submarŝipo jam inventita de kartagenano, kaj funkcianta, ne estis tie. Ĝi jam povis ĵeti torpedojn. Du submarŝipoj povintus submarigi la tutan mararmeon usonan, kiu atakis Kubon je 1898. Sed tiuj du submarŝipoj ne ekzistis pro stulteco de la registaro de Hispanio. Pro tio la Imperio Hispana malaperis, kaj nun ni estas sengrava lando en la mondo.

**Estantistoj** eble obĵetos, ke **danke al Dio ne plu estas imperio hispana**. Tamen, estis **Brita** Imperio poste, kaj **Usona** imperio nun, kaj eble en la ĵusa estonteco estos imperioj Ĉina aŭ Rusa... Sed ni vidu, ĉu Britio donis britan civitanecon al siaj subuloj de la kolonioj, aŭ Usono faras same en siaj konkeritaj landoj. Se germano aŭ japano deziras vivi en Usono nun, ili ne povas pledi, ke ili havas usonan civitanecon pro tio, ke ili jam estis konkeritaj de la Imperio Usona dum la Dua Mondmilito. Male, en

Usono nigrulo rajtis edziĝi al blankulino nur en la lasta parto de la 20<sup>a</sup> jarcento, dum en Sudameriko tiun rajton garantiis jam reĝino Isabel' kvin jarcentoj antaŭe. Usono sendependiĝis ĉar ili ne havis voĉon en la Brita Parlamento, tamen **indianoj havis voĉon en la Konsilantaro de Indianoj** laŭ la tuta Ameriko hispana. Indianoj de Hinda Kolonio de Britio neniam estis civitanoj britaj, tamen indianoj de Sudameriko estis subuloj de Kastilio, samrajtaj kiel tiuj naskiĝintaj en Kastilio mem, de la unua tago, kiam hispanoj alvenis en Amerikon. Pro tio estas imperioj kaj imperioj. Kaj neniam estis du samaj. Romianoj forviŝis la kulturojn de la popoloj, kiujn ili konkeris. Hispanoj kreis katedrojn pri keĉŭa kaj gvarania kaj aliaj indianaj lingvoj en la unuaj universitatoj kreitaj en la tuta kontinento. Sed tion faris inteligentaj registaroj de Hispanio.

Bedaŭrinde, ne ĉiu registaro de Hispanio estis inteligentaj. Idiotaj registaroj rifuzis konstrui submarŝipon tiam, kiam Hispanio plej bezonis ilin. Alia idiota registaro rifuzis protekti kaj disvolvigi aŭtogiron de Johano de la Cierva, kaj sekve li devis trovi apogon en Britio kaj Usono je la 20<sup>a</sup> jarcento. Alia idiota registaro provis depreni rajtojn al civitanojn, kiuj ne akceptis la dogmojn komunismajn dum la tiel nomata Dua Respubliko, kiu nek estis dua, nek estis respubliko. Ne estis dua, ĉar la tiel nomita **Unua ne estis ankaŭ respubliko**, ĉar **Respubliko estas la afero de ĉiuj**, kaj la unua estis la afero de tavolo de politikistoj, kiuj regis dorse al popolo kaj ties bezonoj. Same faris la politikistoj de la reĝimo starigita fraŭde je 1931, sed ili almenaŭ serĉis la aprobon de la popolo, trovante ĝin nur en parto de la civitanaro. Ili promesis tion, kion ili poste perfidis, kaj la afero alfluis al senpunaj murdoj kaj bruligo de preĝejoj kaj forrabo de artaĵoj kaj valoraĵoj *pro la bono de la celo*.

Kaj tio venigas nin al konsidero pri la nuna registaro. Ĝi estas la plej **malbona aspekto de la mizera reĝimo** de reĝo de partioj politikaj, la **partiokratio**, kiun ni suferas de 1978. Mi akuzas pri misuzo kaj troigo de povo al ĉiu registaro memnomita *demokrata*, sur kiu la civitano komuna havas neniun kontrolon kaj pri kiu reganta elito neniel respondecas. Diri, ke niaj regantoj nunaj estas idiotaj estus troige, ĉar ili nur faras tion, kion povas esperi homoj, kiuj voĉdonas ilin, sciante, ke ili perfidos sian programon priedektan laŭ siaj profito persona kaj ideologio. Pro tio ili devigas sur nin kondutojn strangajn al ni, kaj leĝigas pri aferoj, kiuj tute ne zorgas aŭ konvenas al ni.

Eble iam venos denove registaro hispana inteligenta, kiu forviŝos ĉiujn ĝiajn senutilajn leĝojn, kaj agos favore al popolo, kaj ne al si. Ni esperu, sed ni agu, por ke tio okazos.

Politiko

## Pri Reĝa Pardonono

### Tial Reĝo Filipo 6<sup>a</sup> ne povas pardoni independistojn katalunajn.

Tiun artikolon mi povus titoli *Malferma letero al Isabel Díaz Ayuso*, mia opinie la sola nuna politikisto, kiu indas respekton kaj kredecon, ĉar ĉiuj aliaj ne ĉesas profiti al sia propra intereso, kaj ŝi —male al komunaj politikistoj— dediĉas siajn fortojn al bonfarto de tiuj civitanoj sub sia zorgo. Tamen mi komencas mian argumenton per amika kontraŭpostulo, ĉar vi, prezidantino de la Madrida Komunumo —kaj eĉ se vi estus nur nekonata politikisto, kiel vi estis, kiam via amiko Pablo Casado decidis kandidatigi vin ĉar li ne sciis, ke vi estas pli brila ol li— vi devus bone legi la hispanan konstitucion kaj apliki ĝin sen iamaniere interpreti ĝin, ĉar por fari tion ekzistas juĝistoj. Sed vi, kiel la aliaj politikistoj de via *kordo* kaj tiuj aliaj de ĉi tiu malkonkorda gitaro, kiu estas Hispanio, aĉetis la mensogojn de la maldekstro sen pridubi ilin eĉ unu fojon.



Ni vidu, kial mi diras ĉi tion:

- 1 **Artikolo 62-i de la Hispana Konstitucio**, —bedaŭrinde la sola, kiu ankoraŭ nun validas en nia lando— diras, ke apartenas nur al la Reĝo *la ekzercadon de la rajto de graco laŭ la leĝo, kiu ne eblas koncesii ĝeneralajn pardonojn*.
- 2 Du artikoloj poste, **64-1**, diras, ke la agoj de la Reĝo estos alsubskribitaj de la Registara Prezidanto, aŭ laŭokaze de la kompetentaj ministroj.
- 3 Kaze de duboj, la **punkto 2 de tiu artikolo** diras, ke la homoj, kiuj alsubskribas la decidojn de la reĝo, respondecos pri ties agoj, ne Lia Majesto.
- 4 Ĉar mi ne konsideras min tro klera, mi devis iri al la Vortaro de la Reĝa Akademio de la Hispana Lingvo (brutale referencata DRAE,

kiam oni devas diri DRALE) por ekscii, kio estas "alsubskribi". Kaj mi trovis la jenon: *Rajtigi alian dokumenton per la persono leĝkapabla fari tion.*

5 El tio ni povas eltiri du aferojn:

- a) Ke la Reĝo povas fari ĉion, kion li volas, kaj la Registaro devas alsubskribi ĝin, se oni akceptas la iomete imperativan karakteron de la ostempo en nia lingvo.

Tamen mi preferas la alian eltiron:

- b) Por tio, ke la la dokumento havas valoron, ĝi devas esti alsubskribita ankaŭ de la Prezidanto de la registaro aŭ de la Ministro de la koncerna afero; se oni ne akceptas la imperativan karakteron de la ostempo. Esas klare, ke la punkto 64-1 havas la verbon *alsubskribi* per pasiva voĉo, kaj tial tiu, kiu faras la agon, estas la Reĝo kaj tiu, kiu subtenas ĝin per alsubskribo, estas la Prezidanto de la Registaro, kaj ne la malo. **Sekve, tio signifas, ke:**

6 **Pedro Sánchez Castejón NE POVAS decidi pardon** iun ajn.

Tio estas la prerogativo de la reĝo kaj de neniu alia, kiel okazas en ĉiuj landoj, ĉar pardono estas donita de la ŝtatestro, kaj ne de la ekzekutivo, kiel la maldekstro mensogas vaste ajn. Se Filipo la 6<sup>a</sup> decidus pardonon la katalunajn puĉistojn, Pedro Sánchez povus kontraŭi ĝin, kaj tiam tiu pardono ne estus permesita. Sed se la prezidanto aprobus ĝin, tiam la respondeco pri ĝi ne apartenus al la reĝo —tie vi eraris, Izabela: la reĝo neniam estus komplico. Li donas ĝin ĉar li volas kaj ekzistas neniu ebla diskuto— sed nur de la Prezidanto de la Registaro. **Do:**

7 Pedro **Sánchez ne povas promesi**, kaj sekve li ne devis promesi, pardonon la kondamnitajn katalunajn krimulojn, sed ĉiuokaze peti tiun gracon al Lia Moŝto Filipo la 6<sup>a</sup>, kiu povus rifuzi fari ĝin, kaj tiaokaze la Prezidanto havus nenion por fari, sed akcepti la rifuzon, kaj alfronti la sekvojn de la malplenumo de sia promeso, kiu ne estis en lia povo fari. Same kiel se li promesis al la katalunoj fondi kolonion sur la Luno, pli malpli ...

Sed estas io pli, ne foriru ankoraŭ:

8 **Artikolo 6-h** donas al la Reĝo la superan komandon de la armeo kaj la ĝendarmaro.



9 **Artikolo 2** kondiĉas, ke la **Konstitucio baziĝas sur la nesolvebla unueco de la Hispana Nacio**, kaj de la komuna kaj nedividebla patrujo de ĉiuj hispanoj.

Pro ĉio ĉi, ke ni scias legi ilin kaj ni legas la konstitucion, ni scias, ke en ĉi tiu stato, la Reĝo rajtas per nia *Magna Carta* —eĉ se ĝi estas *donacita* kaj ne efektive eliras el la popolo— por eksigi la nunan registaron pro ties atako al la unueco de la lando, kaj kunvoki novajn balotadojn, kvankam estus bone, se intertempe ĉiuj partioj, kiuj ne ĵuras obei la hispanan konstitucion de 1978, estus malpermesitaj, almenaŭ tiel longe kiel ĝi estas ne ellaborita kaj aprobita per referendumo de kvalifikita plimulto de ĉiuj partioj, hispanoj, sen timo de involucio, kiel okazis en 1978.

10 **Artikolo 8-1** kondiĉas, ke la Armitaj Fortoj *havas la mision garanti la suverenecon kaj sendependecon de Hispanio, defendi ĝian teritorian integrecon kaj la konstitucian ordon.*

Pro ĉio ĉi, admirita Izabelin', vi ne eraris tiel same kiel via partia estro kaj aliaj politikistoj —ne paroli pri la oficialaj kaj privataj malinformantoj en ĉi tiu taŭra felo— sed vi iomete seniluziigis min, kiam vi retiris viajn vortojn nur kelkajn horojn post kiam vi estis tiel brila. Sed ne, la reĝo ne povas perfidi, ĉar li estas la objekto de ĉiu ebla perfido en ĉi tiu lando, tiel ke ĉiu perfido al Hispanio estas perfido al la reĝo. Kaj ĉiu perfido al la reĝo estas perfido al Hispanio, kiu estas la tutaro de la homoj, kiuj loĝas en Hispanio, la Reĝo inkluzivita.

Sed, ĉiuokaze, mi pensas, ke ĉi tiu lando bezonas pli da politikistoj kiel vi, Isabel Díaz Ayuso, sen hakaj vortoj kaj sen la ideo de muzelo malhelpanta vin diri kaj fari la ĝustan aferon por servi la hispanojn, kio estas la maksimuma aspiro de ĉiu vera politikisto. Mi konsideras la ceterajn viajn kolegojn malbenitaj politikistoj, kaj preferinde ili ĉiuj rezignus siajn postenojn kaj estus anstataŭigitaj de veraj politikistoj, kiel vi kaj Cayetana Álvarez de Toledo, ĉar vi komprenas kion fari kaj diri, kaj vi faras ĝin kaj vi diras ĝin. Neniam bedaŭru tion. Pli bone estas peti pardonon ol permeson, kiel vi iam diris.

Kaj se neokupataj leganto bonvolas, oni povus legi la rakonton, kiun mi publikigis antaŭ kelkaj monatoj en mia retejo (bedaŭrinde nur en la hispana, nune) pri **envio**, kiu plene tuŝas ĉi tiun temon:

<http://www.obracompleta.com/obras/capitales.html#candidato>

## All you need is love!

**Ĉio, kion oni bezonas, estas amo!**, diris The Beatles je la 25<sup>a</sup> de junio de 1967, antaŭ 50 jaroj kaj unu monato je la momento, kiam mi verkas ĉi tion. Mi tiam ne bone komprenis kial ilia kanto komencis per la unua parto de la himno de Francujo, **La marseleso**, en la unua programo televida tutmonda, **Our World** (Nia mondo), en kiu multaj landoj partoprenis, elsendante po kelkaj minutoj. BBC (la oficiala brita televido) mendis tiujn minutojn al plejfama brita aro da kantistoj tiutempa, kaj ili produktis tiun kanton.



Sed la kanto enhavas ankaŭ aliajn melodiojn, nome *Elpensajon* 8<sup>a</sup> en F (transportitan en G-n, de germano Johan' Sebastjan' Baĥ'), *Greensleeves*, (*Verdmanikulinon*, brita popol-kanto atribuita al reĝo Enriko 8<sup>a</sup>), *En la sinteno* (In the Mood, kanto de usona

Glenn Miller), pecon de *Ŝi amas vin* (She Loves You, kanto de The Beatles mem), kaj la finon de la *Marŝo de la Princo de Danio* (de Jeremiah Clarke, brito de la 17<sup>a</sup> jarcento).

Multaj britoj protestis pri tio, ĉar temis pri io de la propra lando, kaj ne internaciaĵo, sed ili diris, ke ankaŭ temis pri monda televido, sed ĝi iĝis baldaŭ himno de paco.

Ne surprize, laŭ mi, ĉar mia eltrovo, la unuaj notoj reprezentas kanton de batalo. La unuaj vortoj, kiun ili ne kantis, sed estis ludita de fanfaro, fakte diras *Ni ekiru, infanoj de la patri', la tago de glor' jam alvenis. Kontraŭ ni de la tirani' la sanga brako estas levita...*, kaj tiel plu iras la vortoj al pli kaj pli da perforta lingvaĵo, kiu iras en la dua stanzo al vortoj pri **tranĉi la kapojn** de gereĝoj kaj aliaj, kiuj oponas al ili. Al tiuj vortoj de tiuj, kiuj supozeble defendas Liberecon, Egalecon kaj Fratecon, The Beatles oponas la refreton **Ĉio, kion vi bezonas, estas amo!** Sed por kio? Dekomence ili klarigas: *estas nenio, kion oni povas fari, kion vi ne povas fari, estas nenion, kion oni povas kanti, kion vi ne povas kanti, nenion oni povas diri, sed vi povas lerni ludi la aferon...*, *vi nur bezonas amon!* Se vi amas, vi povas fari ĉion. Kaj tio estas bona kaj bela mesaĝo, ĉu ne?

## Historio

## Du gravaj centjariĝoj

Oni diras, ke civila malobeo estu kontraŭ la registaro, ĉefe se ĝi estas turpe maljusta ĉar manko da demokrateco ne permesas maldungi ties funkciojn altajn. Tamen, estas civila malobeo al publika opinio, kiam ĝi kontraŭstaras dececon, logikon kaj juston.

Dum mi pretigas ĉi tiun kajeron okazis centjariĝojn de la mortoj de du el niaj elstaraj kuncivitanoj: **Fernando de Magaljano** (kvinan, la 25<sup>an</sup> de aprilo) kaj **Emilja Pardo Bazan'** (unuan, la 12<sup>an</sup> de majo).

Pri la unua homo, ni laste aŭdis sufiĉe da stultaĵoj diritaj de ignorantoj, kiuj devus fieri pri li kaj pri lia leŭtenanto, Johan' Sebastjan' Elkan'; sed laste oni hontas kaj koleras pro la grava laboro de hispanoj en Ameriko kaj en la cetera mondo. Oni diras, aliflanke, ke Magaljano estis portugalo, kaj sekve lia grava tasko, ĉirkaŭiri en la mondon, apartenas al Portugalio kaj ne al Hispanio. Fakte, Fernando de **Magalhães** hispanigis sian nomon al **Magallanes** ĉar la imperiestro de Hispanio kaj Germanio, **Karlo I<sup>a</sup>**, donis al li hispanan civitanecon kaj **pagis la koston de la entrepreno**. Portugalio, male, provis malfaciligi ĝin, kaj ili eĉ kaptis kelkajn

partoprenantojn en la tasko ĉirkaŭiri la mondon kvazaŭ ili estus krimuloj, ĉar ili preterpasis teritorion aljuĝitan al Portugalio




Fernando de Magallanes

de la Papo. Kvazaŭ la mondo apartenus al la Papo aŭ al portugaloj. Kiam Admiralo Fernando de Magaljano mortis en Filipinaj Insuloj, **Johano Sebastjano Elkano** daŭrigis la entreprenon, kaj iĝis la homo, kiu estis *Primus circumdedisti me*, laŭ diraĵo de la imperiestro mem: *vi estas tiu, kiu unue ĉirkaŭais min*. Se Elkano estus anglo aŭ franco, li havus placon kaj straton dediĉita al li en ĉiu urbo grava de la lando. Sed hispanoj ŝajne hontas pri siaj gravaj faraĵoj, ĉar ili stulte miras pri

eksterlando, kvazaŭ eksterlando iam fario ion diversa ol malutili al Hispanio...

Pri **Doña Emilia Pardo Bazán** la afero estas alia: dum sia



Emilia Pardo  
Bazán

vivo ŝi estis malfaciligita de hispanoj. Pro tio, ke ŝi estis virino, oni ne akceptis ŝin en la Akademion de la Lingvo Hispana, malgraŭ ŝia literatura agado grava. Estis aliaj tempoj, certe, kaj malgraŭ leĝo favoris ŝin, sed ne la malvasta menso de ŝiaj samtempuloj. Estas ŝoke, ke krom esti unu el niaj plej gravaj literaturistoj, ŝi agis por la rajtoj de virinoj age, pli ol vorte, male al feministinoj hodiaŭaj: ŝi pledis, ke reĝino de Kastilio, Johano Trastámara —alidirita *La Frenezulino*—, filino de Isabelin' *La Katolikino* (alidirite la

Unua Regino de Hispanio) —kaj fakte la plej bona reĝo de nia lando—, leĝigis, ke virinoj havas samrajtojn kiel viroj en ŝia reĝno, kaj tiun leĝon neniam registaro malrajtigis. Pro tio ŝi povis diri sian tezon kaj doktoriĝi. Bedaŭrinde, la Reĝa Akademio de la Lingvo Hispana estas privata asocio, kaj sekve la leĝo de la Reĝino Johano ne protektis ŝin por tio. Interese por ni estas, ke inter ŝiaj verkoj estas **La podio**, en kiu ĉefrolas Amparo, la unua proleta rolo en hispana literaturo. Ŝi starigas strikon de cigaristinoj, kaj en la novelo ankaŭ estas priskribitaj la kondiĉoj de tiaj laboristinoj, do estante la verko la unua ekzemplo de Naturalismo en nia literaturo, ĝenro uzata de Balzac en Francio kaj Emerson kaj Thoreau en Usono. Ŝia amrilato al Benito Pérez Galdós okazigis influon de unu en la alian.

Triste estas konstati, ke en Hispanio neniu festis tiujn du gravajn centjariĝojn, malgraŭ la ekzisto de **Ministerioj** pri **Egaleco** kaj tiu pri **Kulturo**. Ŝajnas, ke tiu ĉi generacio ne meritigas tiujn geniulojn de nia istempo, kaj preferas enmeti sin en modojn stultajn kaj fremdajn al ni kaj al nia kulturo. De niaj modestaj paĝoj ni festu ilin du!

## 6 Kompletaj venĝo


La sekvan tagon mi vekigis ĉirkaŭ la deka. Mi dormis kiel bebo, kontenta pri mia plenumita devo. Mi aĉetis la gazeton kie ajn, kaj sidis kie ajn, en la anasa parko, por trankviligi ĝin. La fraptitolo estis skandala:

### Duobla murdo sur strato del Pez

La artikolo rakontis la agadojn de tiuj virinoj kaj konjektis pri la strangaj murdoj. Neniuj dokumentoj estis trovitaj, kiuj rilatigis ĉi tiujn virinojn inter si aŭ al aliaj homoj, kio donis al mi paŭzon pri policaj kapabloj: aŭ ili estis tro longaj, aŭ ili falis tro mallonge. Ili arestis iun Tomás Pérez kiel supozatan aŭtoron de la murdoj. La menciita Tomás frekventis la virinon ligitan en la Kruco de San Andreo (stranga nomo por tiu giganta ligna X) kaj oni supozis, ke ĝi estis kazo de ĵaluzo.

Aferoj ne povus esti pli bonaj por mi. Dio ekzistis!, kaj Li ĵus donis al mi manon: nun mia amo, Brendin', ŝi ne plu sentos sin malbone kaj mi povus rekonkeri ŝin, ĉar ŝi ne plu sentos sin kulpa pri sia perversa edzo, kiu estis en malliberejo. Tio signifis, ke mi ne povos mortigi lin ĝis post venontaj jardekoj, sed eble li ne bezonus ĝin plu, se li reformus tie.

Sed la ĵurnalo antaŭenigis aliajn alternativajn teoriojn, kaj ne estis ekskludita la eblo, ke unu el la viktimoj ĉantaĝis politikiston kaj alian gravan personon kaj ke pro tio oni mortigis ŝin, kaj la alia virino havis la malbonŝancon atesti ĝin.




## Pri la devo de civila malobeo (daŭrigo)

verkita je 1849 de Henry D. Thoreau  
Tradukita de Jesuo de las Heras je 2021

Tamen ĉi tiu registaro neniam per si mem antaŭenigis iun ajn entreprenon, sed per la fervoro, per kiu ĝi forlasis sian vojon. Ne estas ĝi tiu, kiu kolonizas okcidentan landon. Ne estas ĝi tiu, kiu edukas. Ĝis nun, la propra karaktero de la popolo usona estas tiu, kiu konkeris ĉiujn siajn atingojn, kaj sukcesintus pri multe pli da ili, se la registaro ne venintus en la vojon kelkjan fojojn. Ĉar registaro estas rimedo, per kiu homoj volonte sukcesus lasi trankvilaj unu la aliajn; kaj, kiel dirite, kiam ĝi estas plej oportuna, la regatoj estu pli bone forgesitaj de la registaro. Komerco kaj negocoj, se ili ne estus verŝjane faritaj el hinda kaŭĉuko, neniam sukcesus superi la obstaklojn, kiujn leĝdonantoj senĉese starigas sur ties vojo; kaj, se oni juĝus ĉi tiujn homojn tute laŭ la efikoj de iliaj agoj kaj ne parte laŭ iliaj intencoj, ili meritis esti klasifikitaj kaj punitaj same kiel tiuj krimuloj, kiuj metas ŝtonojn sur la fervojoj.

Sed, por paroli praktike kaj kiel civitano, male al tiuj, kiuj nomas sin neregistaraj viroj, mi petas, ne tuj neniun registaron,

sed tuj pli bonan registaron. Ĉiu



viro sciigu, kia registaro regus lian respekton, kaj tio estos unu paŝo por akiri ĝin.

